# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-29 n-ro 370


# Kubo: la labormerkato estas uzata por silentigi ĉian opozicion, laŭ Internacia Amnestio




Kurda regiono en Irako volas dialogi kun centra registaro

Okazis konflikto inter Talibano kaj Islama Ŝtato

El Popola Ĉinio serĉas e-istan redaktoron

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

Kubo: la labormerkato estas uzata por silentigi ĉian opozicion, laŭ *Internacia Amnestio*
*Diskriminaciaj maldungoj p. 03*

Kurda regiono en Irako volas dialogi kun centra registaro
*Nechirvan Barzani p. 04*

Okazis konflikto inter Talibano kaj Islama Ŝtato
*Almenaŭ dekmil lokaj familioj rifuĝis p. 05*

Kunordigantoj de BRICS-landoj retrorigardis progreson de kunlaboro en 2017
*"Ora Jardeko" p. 05*

Pli ol 20 miloj da tibetlingvaj antikvaj volumoj estis diĝitigitaj
*Redakto kaj traduko de tibetlingvaj historiaj dokumentoj p. 06*

Enskriboj sur testudkarapacoj aldonitaj en Memoron de Monda Registro
*Pratempaj skriboj p. 07*

Ferdinando Palasciano
*Ruĝa Kruco p. 08*

Frans Krajcberg - defendinto de la naturo
*Defendi la planedon Tero p. 09*

Hodiaŭe
*Andrés Bello; C. S. Lewis; Louisa May Alcott; Wilhelm Hauff; kaj Leonino p. 10*

El Popola Ĉinio serĉas e-istan redaktoron
*Verkado, lingvopolurado de artikoloj en Esperanto, muntado de filmetoj p. 12*

# Kubo: la labormerkato estas uzata por silentigi ĉian opozicion, laŭ *Internacia Amnestio*

*Internacia Amnestio* publikigis ĵaŭde la 16an de novembro raporton pri la maniero, per kiu la insula reĝimo uzadas la labormerkaton, kiel persekutan rimedon. Laŭ tiu studaĵo, la kubaj civitanoj suspektataj pri ia ajn kritiko koncerne la vivkondiĉojn en la lando, riskas suferi turmentadon en sia laboro, aŭ eĉ resti senlaboraj. La aŭtoritatoj uzadas sian kontrolon de la labormerkato, kiel plian premrimedon.




La raporto demonstras, ke jardekoj da arbitra uzado de la punleĝoj kaj aliaj kontraŭleĝaj praktikoj, kiel diskriminaciaj maldungoj en la kreskanta privata sektoro, kondukis al sistemo, en kiu eĉ la Kubanoj, kiuj ne estas politike engaĝiĝintaj devas eviti kritikon kontraŭ la registaro, se ii volas konservi sian laborpostenon.

Kubo estas regule kritikata pro siaj malobservadoj de la homaj rajtoj. Sed tiuj ĉi praktikoj, estas malofte kritike priraportataj

Kubo estas la sola lando el la amerikaj regionoj, kien *Internacia Amnestio* ne povas iri, precizigas la organizaĵo. La esploristoj de la organizaĵo interparolis do kun pli ol 60 kubaj elmigrintoj en pluraj meksikaj urboj, en la celo kolekti iliajn atestojn pri la ĉiutaga vivo en lando, kie la esprimlibereco estas de longe bremsata.

«La enketo malkaŝis al ni, je kia grado la nuna situacio estas katastrofa, Kiel pri ekonomio, tiel pri esprimlibereco por la tuta loĝantaro, kaj aparte pri la laboro. La labormerkato fakte estas uzata kiel premrimedo, draste limigante la sindikatajn liberecojn, sed ankaŭ senigante la personojn je iliaj laborpostenoj. Esprimado de sia opinio, estas ofte konsiderata kiel kontestado de la registaro», resumas la specialistino Geneviève GARRIGOS, respondeculino pri la regiono Amerikoj ĉe *Internacia Amnestio.*

**«Vi ne estas fidinda»**

Asertiĝas tamen, konkludas la studaĵo, ke plimulto el la renkontitaj personoj «neniam kritikis la politikan kaj ekonomian sistemon de Kubo, kaj neniam partoprenis ian aktivecon aŭ politikan opozicion». Sed duono el ili spertis malliberecon almenaŭ unu fojon.

*Amnesty* citas kiel ekzemplon la antaŭnelongan historion de Jorge LUIS. Tiu sportisto medalita konfidis al la NRO, ke post lia aserto, dum intervjuo

en la publika televido, ke la Kuba registaro ne financas tiun sporton, li estis iom post iom eksigita el sia sporto, kaj estis maldungita el sia laborposteno en la publika funkcio. Li simple estis informita, ke li ne plu plenumas la kondiĉojn necesajn al sia laboro.

Li deklaris, ke li disponis pri 20 tagoj por trovi novan laboron, male la polico indikis, ke li estos kulpigita pri «danĝereco». Li ne sukcesis trovi alian laboron, ĉar ĉiuj dungantoj respondis, ke li estas «kontraŭ-revoluciulo». La uzata esprimo de la kastra reĝimo estas: «vi ne estas fidinda», alidirite, vi ne konvenas al la revolucia ideologio.

**Por multaj, la sola solvo estas fuĝo**

«Tiuj praktikoj estas vastege uzataj, kaj pro tio la personoj, kiuj parolas tro libere, estas senigitaj je siaj laborpostenoj», daŭrigas Geneviève GARRIGOS. La koncernataj Kubanoj «troviĝas tiam en dramaj situacioj, sciante ke hodiaŭ, la baza salajro estas je 25 dolaroj, kio ne ebligas al ili vivteni sin».

«Eĉ la ĝenerala sekretario de la sindikato de la laboristoj, agnoskita de la kuba registaro, agnoskis, ke en tiu kunteksto, koncerne jen la laborkondiĉojn, jen la salajran nivelon, plena apatio regas, kaj la homoj eĉ ne plu emas labori. Pro tiomiloj fuĝas la landon eĉ ankoraŭ hodiaŭ», bedaŭras la respondeculino de *Amnestio*. Kiel la ĉampiono Jorge LUIS.

Neniam Milito Inter Ni

---

# Kurda regiono en Irako volas dialogi kun centra registaro

Ĉefministro de la Kurda aŭtonoma regiono en Irako, Nechirvan BARZANI, diris lunde [27 nov 2017], ke la Kurda regiono volas serioze dialogi kun la Iraka centra registaro.



La plej supera kortumo de la Iraka federacio publikigis verdikton la 20an de tiu ĉi monato, konstatantan, ke la referendumo pri sendependeco, okazigita en la Kurda regiono, malobservis la Irakan Konstitucion. La kortumo ankaŭ deklaris aboli ĉiujn rezultojn kaŭzitajn de la referendumo. BARZANI diris lunde [27 nov 2017] en gazetara konferenco okazigita en Erbil, ke laŭ la verdikto de la plej supera kortumo, Bagdado devas nuligi ĉiujn rimedojn kontraŭ la Kurda referendumo.

Spite al ĝenerala opono, la Kurda regiono okazigis referendumon la 25an de septembro. La centra registaro plurfoje akuzis la Kurdan regionon pri malobservo de la Konstitucio, kaj prenis serion da kontraŭrimedoj post la referendumo. La centra registaro kelkfoje ripetis, ke dialogo premisas nuligon de rezultoj de la referendumo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Okazis konflikto inter Talibano kaj Islama Ŝtato

Afganaj amaskomunikiloj raportis, ke ekstremistoj de la grupo Islama Ŝtato en la afgana orienta provinco *Nangarhar* lastatempe konfliktis kun batalistoj de Talibano, kaj pro almenaŭ dekmil lokaj familioj rifuĝis.




Lokaj amaskomunikiloj raportis, ke la konflikto okazis en la regiono *Khogiani* en la sudokcidenta parto de la provinco, kaj almenaŭ 19 batalistoj de la du flankoj estis mortigitaj en la batalo.

Informita persono diris, ke por eviti la batalon, multaj familioj fuĝis al najbaraj regionoj en profunda nokto. La vivkondiĉoj de tiuj rifuĝintoj maltrankviligas, ĉar al ili mankas nutraĵo kaj aliaj ĉiutagaj necesaĵoj.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Kunordigantoj de BRICS-landoj retrorigardis progreson de kunlaboro en 2017

Kunordigantoj de BRICS-landoj lunde [27 nov 2017] konsentis preni la Pintkunvenon de *Xiamen* kiel novan deirpunkton, kaj denove promesis labori pli energie por plia "Ora Jardeko" de la kunlaboro de BRICS-landoj.




La promeso estis farita en la kvina kunveno de kunordigantoj de BRICS-landoj, kiu okazis lunde [27 nov 2017] en *Changsha*, ĉefurbo de *Hunan*-provinco en centra Ĉinio.

La kunveno estis prezidita de Li Baodong, kunordiganto por BRICS-aferoj kaj vicministro pri eksterlandaj aferoj de Ĉinio, kaj ĝin ĉeestis kunordigantoj de BRICS-landoj kaj reprezentantoj de la Nova Disvolva Banko.

Partoprenantoj en la kunveno retrorigardis la progreson de la kunlaboro de BRICS en ĉefaj kampoj, kiel ekzemple komerco, financo kaj politiko en la kuranta jaro.

Ĉi-jara pintkunveno de BRICS-landoj okazis en la orienta marborda urbo *Xiamen* en *Fujian*-provinco de la 3a ĝis la 5a de septembro.

Yu
Ĉina Radio Internacia



## Pli ol 20 miloj da tibetlingvaj antikvaj volumoj estis diĝitigitaj

Vicestro de la *Gansu*-provinca centro pri redakto kaj traduko de tibetlingvaj historiaj dokumentoj, Su Dehua, informis la 22an de novembro, ke la centro komencis ordigon, redakton kaj tradukon de la tibetlingvaj historiaj dokumentoj de la templo *Labrang* en septembro de 2014, kaj ĝis nun pli ol 20 miloj da antikvaj volumoj de la templo estis diĝitigitaj [ciferecigitaj].

La templo *Labrang*, apartenenta al *Geru*-skolo de la tibeta budhismo, havas pli-ol-tricent-jaran historion kaj estas honore titolita kiel "monda institucio de tibetologio". Ĝi havas plej multajn dokumentojn kaj eminentajn erudiciulojn kun plej alta klero en Ĉinio. Nun sume 68 miloj da antikvaj dokumentoj estas bone konservataj en la templo.


Su Dehua konigis, ke en la lastaj tri jaroj, la centro faris katalogon de pli ol 20 miloj da antikvaj dokumentoj kaj tajpis ilian enhavon en komputilon. Cetere la centro faris diĝitigitan laboron ankaŭ al antikvaj tibetlingvaj dokumentoj de *Dunhuang*, *Liangzhou* kaj diversaj lokoj de *Gansu*-provinco.

Su Dehua informis, ke laŭ plano, ĉiuj dokumentoj de la templo estos tajpitaj en komputilon en 15 jaroj, kaj ili faros ordigon, savadon kaj protekton de raraj dokumentoj kiel prioritaton, inkluzive de tiuj pri tibeta medicino kaj farmacio, tibeta astronomio kaj geologio, teknologio kaj arto kaj historio, kaj tio antaŭenpuŝos protekton kaj heredon de la tibeta kulturo de la templo.

Selena
Ĉina Radio Internacia

# Enskriboj sur testudkarapacoj aldonitaj en Memoron de Monda Registro

La 24an de novembro enskriboj sur testudkarapacoj kaj bestostoj trapasis la ekzamenon de Unesko, kaj estis aldonitaj en la Memoron de la Monda Registro.



**Enskriboj por antaŭdiro kaj preĝo**

Antaŭ pli ol cent jaroj WANG Yirong, erudiciulo en QING-dinastio (1644-1911), trovis malgrandajn bildojn sur *Longgu*, ĉina kurac-herbo. Fakuloj konfirmis, ke tiuj misteraj simboloj estas la pratempaj skriboj -- enskriboj sur testudkarapacoj kaj bestostoj, kaj fruigis la skribe registritan ĉinan historion je mil jaroj.

Enskriboj sur testudkarapacoj kaj bestostoj estas la plej fruaj skriboj de Ĉinio. Elfositaj el *Yin*-ruinoj en *Anyang* de *Henan*-provinco, ili estis uzitaj por aŭgurado en la malfrua SHANG-dinastio antaŭ pli ol 3 000 jaroj. Pro la enskriboj, la evoluo de la ĉina civilizacio daŭris, kaj la hodiaŭaj ĉinaj ideogramoj estas heredataj. Tio estas unika kaj aŭtentika materialo por esplori la longan kaj brilan civilizacian historion de Ĉinio kaj fruajn landon kaj socion.

**Ordigo de enskriboj**

La konservado de la enskriboj en Ĉinio kaj aliaj landoj estis ordigitaj. Estas ĉirkaŭ 160 mil pecoj de karapacoj kun 4 300 unuopaj skriboj, inter kiuj 1 600 estis malĉifritaj. La enskriboj registris devenojn kaj eventojn en la reĝa familio en la malfrua periodo de SHANG-dinastio antaŭ pli ol 3 000 jaroj. Ili estas apartaj kulturaj heredaĵoj pri historiaj memoroj de Ĉinio.

Krome, la ĉina fonduso pri socio kaj scienco jam komencis la esploron pri la enskriboj pere de granda datumaro kaj nub-platformo, kaj Ĉinio starigos datenbankon de la enskriboj. Profesoro GUO Xudong, direktoro de esplor-centro de enskriboj sur testudkarapacoj, bestostoj kaj SHANG-dinastia kulturo, diris, ke trarompiĝos modernaj esploraj metodoj kaj rimedoj por la enskriboj.

**Premio por malĉifro**

La 28an de oktobro lastjare [2016] ĵurnala anonco pri la enskriboj alvokis multajn atentojn: esploro pri malĉifro de unuopa nerekonita enskribo povas ricevi rekompencon je 100 mil juanoj, post juĝo de fakula komitato.

Estas multaj progresoj en la modernigo de esploraj metodoj kaj rimedoj, tamen deĉifro de iu ajn nerekonita enskribo estas malfacilega. En la historo pri esploro de la enskriboj, kelkaj "novaj metodoj" por malĉifri la tutan tekston de la enskriboj sensaciis en la publiko, tamen post la sensacio la esploro ne estis antaŭenpuŝita.

Iuj diris, ke la enskriboj el SHANG-dinastio estas enciklopedio de la socio en tiu tempo. Tamen, ĝis nun legado kaj komprenado de ĉi tiu "enciklopedio" ne estas profundaj kaj kompletaj.

LIU Zijia
El Popola Ĉinio

# Ferdinando PALASCIANO

Estas komuna opinio, ke la ideo pri Ruĝa Kruco venis unue al la sviso Henry DUNANT, sekve de la sangoplena batalo ĉe Solferino (1859). En realo, la unua ideo venis al italo (pli precize, sudano el Kapuo apud Napolo), Ferdinando PALASCIANO, naskiĝinta la 13-an de junio 1815 kaj mortinta la 28-an de novembro 1891.



Dum la ribelo de Mesino de 1848(*), la kirurgo Ferdinando PALASCIANO, juna oficiro de la burbona armeo, malobeis al la ordono de generalo Carlo FLANGIERI, ke oni kuracu nur la burbonajn soldatojn, kaj sukuris ankaŭ la ribelulojn. Pro ĉi tio li estis procesita kaj kondamnita al morto, sed la reĝo FERDINANDO la dua aliigis la punon al unujara karcero.

Ankaŭ dum la batalo ĉe Volturno (1860), Palasciano reasertis la rajton de la vunditoj esti kuracataj, sendepende de la survestita uniformo.

Post la falo de la burbona monarkio, PALASCIANO povis libere prezenti siajn ideojn, kaj, okaze de Internacia Kongreso okazinta en Napolo en aprilo 1861, asertis: “Estus necese ke ĉiuj militantaj Potencoj, en la militdeklaro, reciproke rekonu la principon de neŭtraleco de la vunditaj batalantoj dum la tuta tempo de ilia kuracado, kaj respektive adoptu tiun de la nelimigita pliigo de la sanitara personaro dum la tuta tempodaŭro”.

Per ĉi tiu parolado, kiu havis vastan eĥon en tuta Eŭropo kaj, tri jarojn poste, estos ĉe la bazo de la Konvencio de Ĝenevo, Palasciano proklamis, por la unua fojo, la plej gravan el la fundamentaj principoj de Ruĝa Kruco.

(*) Bonvolu permesi al mi personan noton.

Mia familio devenas de Mesino. Dum la ribelo de 1848, iu mia preskaŭ samnomulo (Antonino DE SALVO), laŭ originala karaktero, surmetinte ĉapon kun la skribaĵo “Venki aŭ morti”, ne nur aranĝis taĉmenton da kuraĝaj kaj batalemaj volontuloj, sed ankaŭ aŭdacis postuli la kapitulacon de generalo Paolo PRONIO, komandanto de la Fortikaĵo. Serioze vundita, li mortis viv-bruligite en la brulego de la preĝejeto en kiun li estis transportita.

Mi ne scias, ĉu Antonino DE SALVO estis mia parenco. Sed certe mi retrovas tiun senĝenan spriton en mia patro, Giovanni DE SALVO, presisto, kiu dum la germana okupado de Romo (1943-1944), rekrutita en la Palaca Gardistaro de la Papo, presadis kaŝe kontraŭnaziajn flugfoliojn (hejme kaj… nekredeble, sed vere, interne de la Plurlingva Vatikana Presejo) kaj disdonadis ilin je risko de sia vivo.

Antonio DE SALVO
Esperanto-vivo

# Frans Krajcberg - defendinto de la naturo

La 15-an de novembro forpasis la 92-jaraĝa polo Frans Krajcberg, kiu estis adoptinta en 1957 la brazilan ŝtatanecon.



Li naskiĝis en 1921 en *Kozienice*, Pollando, proksime al Varsovio. 18-jaraĝa, kiam la germanoj invadis lian patrujon – per kio komenciĝis la 2-a Mondmilito –, li fuĝis al Sovetunio, kie li komencis studi arton kaj inĝenieristikon ĉe la Universitato de Leningrado. Kiam tiu urbo estis sieĝata en 1941, li iris al Kazaĥio. En 1943 li aliĝis al la Pola armeo kaj luktis kun ĝi ĝis la fino de la milito en 1945. Reveninte al sia hejma urbeto, li estis forpelita el sia gepatra domo, ĉar li estis judo.

Li vojaĝis al Germanio por serĉi sian familion. Tie li eksciis, ke li estis la sola membro de sia familio kiu postvivis la Holokaŭston.

Dum unu jaro li studis ĉe la Ŝtata Akademio de Belaj Artoj de Stutgarto. Unu el liaj instruistoj, la konata Willi Baumeister, sugestis al li iri al Parizo kaj donis al li rekomendan leteron adresitan al la fama pentristo Fernand Léger. En Parizo Frans Krajcberg loĝis kelkajn monatajn ĉe alia fama pentristo, Marc Chagall, kiu konsilis al li iri al Brazilo.

Li alvenis al ĉi-tiu lando en 1947 – preskaŭ sen iuj ajn financaj rimedoj – kaj komencis labori en la Arta Muzeo de San Paŭlo por gajni monon. Sed li ankaŭ komencis pentri kaj baldaŭ ekspoziciis siajn pentraĵojn en la “San-Paŭla Salono” de Moderna Arto en 1951.

En 1952 li transloĝiĝis al la subŝtato *Paraná* en suda Brazilo, kie li laboris kiel inĝeniero en paperfabriko kaj ankaŭ dediĉis sin al kreado de ceramikaĵoj. Poste li loĝis kaj pentris meze de la arbaro, en ligna domo, "malproksime de la homa barbareco", sed, kiam farmistoj bruligis grandajn areojn por ebligi la kultivadon de kafo, lia domo estis detruita per fajro kaj li perdis ĉion. Li transloĝiĝis al Rio de Ĵanejro, kie li denove pentris, dividante sian atelieron kun la skulptisto Franz Weissmann. Ambaŭ estis elektitaj por la 4-a Bienalo de San Paŭlo, estis premiitaj, kaj Krajcberg ricevis la premion de Plej Bona Brazila Pentristo (brazila, ĉar en la sama jaro -1957- li estis akirinta la brazilan ŝtatanecon).

Estante subite fama, li transloĝiĝis al Parizo kaj setlis– kaj pentris – en la kvartalo *Montparnasse* (kie ankoraŭ ekzistas lia ateliero, nun kun daŭra ekspozicio).

Poste li loĝis kelkan tempon sur la hispana insulo *Ibiza* por esti pli proksima al la naturo. Ĉar li havis sanajn problemojn pro terebintinaj vaporoj, li ne povis plu pentri kaj eksperimentis pri nova tekniko, kiun li igis fama: naturaj presaĵoj sur papero.

En 1964 li revenis al Brazilo kaj ekloĝis en la subŝtato *Minas Gerais*, meze de la naturo. Li komencis fari skulptaĵojn uzante mortajn arbo-trunkojn – por “revivigi” ilin. Li ankaŭ vojaĝis al Amazonio kaj al Pantanalo (grandega kaj grava ekosistemo) en la subŝtato Mato Grosso. Tiam li malkovris la ŝokegan malarbarigon kaj komencis daŭre atesti ĝin per fotoj kaj protesti kontraŭ ĝi per uzado de radikoj kaj bruligitaj trunkoj en siaj

skulptaĵoj.

Invitite de la arkitekto Zanine, li malkovris en 1965 la marbordan urbeton *Nova Viçosa*, en la sudo de la subŝtato Bahio. Por altiri grandajn artistojn al sia teritorio, la registaro estis oferinta arbarajn terpecojn ĉe la marbordo. La virga arbaro, la virga naturo ĝenerale, la mangrovoj kaj la simpleco de la fiŝistoj tuj allogis Krajcberg. En 1971 li konstruis en arbo grandan kabanon, dek metrojn super la tero, "kie je la unua fojo en mia vivo, 50-jaraĝa, mi fine sentis min hejme". Ĉirkaŭe troviĝas liaj atelieroj, la unua piramida domo konstruita de lia amiko Zanine kaj liaj muzeoj: tio estas la "*Sítio Natura*" (Bieneto Naturo), vizitata de homoj el la tuta mondo.


Post plua vojaĝo al Amazonio li lanĉis en 1978, kune kun arta kritikisto Pierre Restany kaj pentristo Sepp Baenderenck, "Manifeston de Integra Naturalismo". Ili kondamnis la organizitan detruon de la arbaro kaj la ekstermadon de la en ĝi vivantaj indianoj kaj alvokis la artistaron fari la samon – t.e. kondamni – per siaj verkoj. Li mem faris tion per siaj fotoj kaj skulptaĵoj. Krajcberg iĝis mediaktivulo kaj daŭre luktis kontraŭ la detruo de la naturo en la tuta mondo. Pro sia sinteno kaj agoj li ofte estis minacata. Aliflanke en la tuta mondo oni rekonis lin kaj lian verkon kaj lukton.

En 2003 estis fondita en Parizo la "*Espace Krajcberg*" (Spaco Krajcberg), en kiu estas ekspoziciataj multaj el liaj verkoj, donacitaj de li al la urbo Parizo. Evidente en Brazilo okazis pluraj ekspozicioj, kaj li publikigis plurajn librojn kun fotoj, aparte pri faŭno kaj flaŭro – kaj ofte montrantaj la endanĝerigatan naturon.

La tuto de lia arta laboro, liaj libroj, liaj filmoj, liaj ekspozicioj, liaj publikaj intervenoj igis Krajcberg unu el la ĉefoj de la batalo por defendi la planedon Tero.

(Informoj ĉerpitaj el Vikipedio.)


Herbert A. Welker
Esperanta Retradio



## Bildo de la tago

**Leonino (*Panthera leo*).**

**Vikipedio**



## Andrés Bello

**Andrés Bello (elp. AnDRES BEljo aŭ BEĝo) (naskiĝis en Karakaso, Venezuelo, la 29-an de novembro 1781, mortis la 15-an de oktobro 1865) estis venezuela humanisto, poeto, leĝisto, filozofo, edukisto kaj filologo, kies verkaro konsistigas gravan parton de la hispanamerika kulturo.**

**En Esperanto aperis:** ***La agrikulturo de la tropika zono*****.**

**Vikipedio**

---

## C. S. Lewis



**Clive Staples Lewis [si es luis] aŭ, plenforme, [klajv stejpelz luis], alnomata Jack [ĝek] (naskiĝis en Belfasto la 29-an de novembro 1898, mortis la 22-an de novembro 1963) estis brita verkisto. Plej konata pro sia fantasto por infanoj (*Kronikoj de Narnio*) kaj multaj religi-filozofiaj verkoj, li ankaŭ verkis poezion kaj sciencfikcion.**

**Vikipedio**

---



## Louisa May Alcott


**Louisa May Alcott (29-a de novembro 1832 – 6-a de marto 1888) estis usona romanverkisto, fame konata por la romano *Little Women*, kiun ŝi verkis en 1868.**

**En Esperanto aperis:** ***Mia Kontrabandulo*****.**

**Vikipedio**

---

## Wilhelm Hauff



**Wilhelm Hauff (naskiĝis la 29-an de novembro, 1802, mortis la 18-an de novembro, 1827) estis germana verkisto, ĉefe konata pro siaj fabeloj.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**

# El Popola Ĉinio serĉas e-istan redaktoron

El Popola Ĉinio (vidu) estas Esperanta retejo, kiu dissendas informojn pri socio, kulturo kaj ekonomio de Ĉinio kaj ankaŭ tiujn pri Esperanto-movado.

El Popola Ĉinio nun serĉas e-istan redaktoron, kiu respondecas pri verkado, lingvopolurado de artikoloj en Esperanto, muntado de filmetoj. La kandidato nepre:

.Havu universitatan diplomon

.Posedu tre bonan skriban kaj parolan lingvonivelon en Esperanto kaj la ĉinan lingvon aŭ la anglan lingvon (por faciligi la vivon en Ĉinio kaj instruadon)

.Estu malpli-ol-50-jara

.Estu sperta en redaktado, verkado kaj pli bone en muntado de filmetoj

.Minimume havu du-jaran laboran karieron per Esperanto

.Bone komprenu la ĉinan kulturon

Por kandidatiĝi, oni sendu al la redakcio de El Popola Ĉinio (13693326472@163.com) elektronikan dokumentaron kun jenaj enhavoj:

- sinprezenta letero, inkluzive de la motivoj por kandidatiĝi;

- vivresumo (persona, eduka, profesia, movada);

- mallonga artikolo en Esperanto aperigita en publikaj revuoj;

- nomoj kaj kontakt-informoj de du rekomendantoj (nepre esperantistoj);

- laŭplaĉe, aliaj dokumentoj kiuj atestas la redaktajn aŭ movadajn kapablojn de la kandidato.

CHEN Ji
El Popola Ĉinio